

CENT DEK TRI
HUMORAĴOJ

VERKITAĴ AŬ ESPERANTIGITAĴ

DE

ESPERANTISTO N.º 10,072

Prezo: 0'40 peseto

VALENCIA

PUBUL Y MORALES.—Editores

Avellanas, 7

1906

668

PUBUL Y MORALES, EDITORES

AVELLANAS, 7-VALENCIA

WAGNER, FISCHER Y GAUTIER

TRATADO

DE

QUÍMICA INDUSTRIAL

Para uso de químicos, ingenieros, metalúrgicos, industriales, fabricantes de productos químicos, farmacéuticos, agricultores, escuelas de artes y manufacturas y de artes y oficios, etc., etc.

CUARTA EDICIÓN FRANCESA (1901-1902)

Primera edición española ilustrada con grabados

Traducción y prólogo de

D. PASCUAL GODO Y LLORENS

Ingeniero industrial, condecorado por méritos de carrera

Dos voluminosos tomos de 1.200 páginas cada uno, impresos en papel superior y satinado. Encuadernado en rústica, 60 pesetas. Encuadernado en planchas, 70 pesetas.

Se admiten suscripciones por cuadernos de 40 grandes páginas al precio de una peseta cada uno.

R-279.

CENT DEK TRI
HUMORAĴOJ

VERKITAĴ AŬ ESPERANTIGITAĴ

DE

ESPERANTISTO N.º 10.032



Prezo: 0'40 peseto

VALENCIA

PUBUL Y MORALES.—Editores


Avellanas, 7

1906

1-80
B-1LC

Es propiedad del autor

Tipografía Moderna, á cargo de Miguel Gimeno



CENT DEK TRI HUMORAĴOJ

I

En vilaĝeto de Andalucio, la protektata de la suno, kie regas ĉiam spriteco kaj bonhumoro, loĝis sinjoro Petro, komisiisto el tiuj kiuj veturas en la ĉefurbojn, por akiri kaj alporti al malgrandaj vilaĝoj ĉiujn mendadojn, kiujn oni al ili antaŭe faris.

S.^{ro} Petro estis bonulo multjara, ĉiam afabla kaj ridetanta, kaj tiel lerta, ke laŭ konfeso de ĉiuj liaj amikoj, neniam oni trompis lin en la aferoj rilatantaj sian negocon.

Kiel agis li por ĉiam triumfi je siaj samlandanoj, malbonaj pagantoj?

Jen estas ekzemplo:

En kvieta vespero de Julia monato, S.^{ro} Petro staris sur trotuaro apud sia pordo hejma, ricevante mendojn pri vojaĝo kiun li estis tuj faronta.

Amaso da infanoj alvenis al li, ĉirkaŭis lin, kaj unue hore, poste unuope, diris: Ho, S.^{ro} Petro! Alportu al mi fajfilon!

S.^{ro} Petro ridetis, kaj afable diris al ĉiu... bone...

tre bone... perfekte... komprenita, k. t. p.; li karexis ĉiujn kaj nek akceptis, nek rifuzis la petojn.

Kiam tumulto pasis, anĝelo kvinjara, modeste vestita, sed ekstreme pura, alproksimiĝis al S.^{ro} Petro kaj balbutante diris: Ho S.^{ro} Petro! multfoje mi, mendis al vi fajfilon, kiun mia patro pagus al vi, kaj vi, S.^{ro} Petro, neniam ĝin alportis al mi; hodiaŭ mia patrino donacis al mi unu *hundineton* (1), prenu ĝin kaj alportu al mi la fajfilon.

S.^{ro} Petro ekkaptis inter siaj brakoj la beletan infanon kaj kisinte lin, respondis... *vi fajfos!*

II

Sesjara knabino vangofrapis sian pli junan fratino.

Kial vi tion faras?—oni diris al ŝi.

Mi ludas kvazaŭ mi estus patrino—ŝi respondis.

III

Malfeliĉa bofilo, gramatika profesoro, diras al siaj lernantoj, klariganta la malsamajn signifojn de la vortoj akcidento kaj bedaŭro.

Supozu ke vi marveturas kun via bopatrino kaj ŝi falas en l'akvon. Tio estas akcidento.

Supozu ke tuj, maristo sin ĵetas en l'akvon por ŝin savi. Jen estas bedaŭro.

IV

Kia feliĉeco, ŝi diris al ia amikino, se homoj estus anĝeloj!

(1) Oni nomas *hundineto* monon, kies valoro estas kvin centinoj da peseto.

—Jes, kara mia, ĉiuj kiuj amis min estis tiaj.

Kial?

—Ho!... ĉar ili forflugis!

V

Al lando alvenas epidemio. La registaro ordonas al ĉiuj urboj, oni prenu antaŭgardojn kontraŭ la malamiko. Urbestro respondas:

«Mi plenumis viajn dezirojn. Fosajoj estas malfermitaj por mi kaj por la ceteraj ĉitieaj ĝenajbaroj.»

VI

Geedzoj iras tra strato. Li multe drinkis kaj insultas ĉiun kiun li trovas.

Homo ofendita de li, diris al li: «Mi eble rompos al vi unu ripo».

La drinkema edzo gaje respondis: «Mia kara. Mi havas la honoron prezenti al vi mian edzinon».

VII

La juĝisto: Ĉu vi ŝtelis tion pro kio oni kulpigas vin?

La kulpigito: Mi... ne, sinjoro. Kaj via Moŝto?

VIII

Nov-Zelanda estro petas al misiisto ke li baptu lin.

—Kiom da edzinoj vi havas? demandis la pastro.

Du, respondis la sovaĝulo.

—Do, mi ne povas bapti vin, ĉar nia religio malpermesas poligamion.

Post malmulte da tempo revenis la sovaĝulo kaj diris:

—Vi jam povas bapti min. Mi nun havas nur unu edzinon.

Kaj la alia?

—Mi manĝis ŝin.

IX

Du edzoj parolas pri kiam ili konis siajn edzinojn. Mi, diras unu el ili, ŝin konis tri monatoj antaŭ nia edziĝo.

Do, mi konis la mian, tri horojn post ĝi, diris la alia.

X

Sesdekjara sinjorino havas filinon kiu ŝajnas kva-zaŭ samaĝa kiel ŝi.

Oni jesigus ke ili estas du fratinoj, diris ia cenzuristo, sed pli prave oni povus diri ke ili estas du patrinoj.

XI

—Leviĝu Peĉjol, forlasu la liton!, Dio helpas tiun kiu frumatenas. Vi jam scias ke nia najbaro, hieraŭ ektagiĝe, trovis moneron sur straton.

—Pli frumatenis la perdinto! Lasu min dormi, patrino!

XII

Edzino preĝas ĉiutage al Sankto Antonio, por ke ŝia edzo fariĝu honesta homo. Post kelkaj monatoj, la

homo mortis kaj la vidvino, antaŭ la Sankta Figuraĵo, diris: «Dankegon, mia amegata Sanktulo! Vi faris ankoraŭ pli ol mi petis al vi».

XIII

Almozulido staris petante almozon al statuo.
Kial vi tion faras? oni diris al li.
—Por kutimigi min ke oni nenion donu al mi.

XIV

Kelnero! Ovajon.
—Ni ne havas.
Kaj viandon?
—Ankaŭ ne.
Kaj fiŝon?
—Ankaŭ ne.
Do, kial oni anoncas la manĝadon laŭvole?
—Sinjoro, ĝi estas laŭvole de la restoracimastro.

XV

—Mia patrino! Mi ne volas edziniĝi je Rikardo. Li diras ke infero ne estas.
—Trankviliĝu filineto! Kiam mi estos lia bopatrino, mi konvinkos lin pri tio.

XVI

Diru, mi petas, kiu estas la plej mallonga vojo por iri al la malliberejo?
—Plezure: Ĉu vi vidas tiun sinjoron? Nu, forprenu lian horloĝon kaj oni kondukos vin tien.

XVII

Volonta soldato estis vundita. Kuracisto, kiu lin kuracas diras: «Tiu ĉi homo mortos; la kuglon trapasis lian cerbon».

—Ne eble, sinjoro, diris la soldato, ĉar mi ne tion havas; se mi havus cerbon, mi ne estus veninta tien ĉi.

XVIII

En lando pluvis oportune. Kampano diras: «Tiu ĉi jaro eliros el tero ĉio kion ni metis sub ĝi».

Kolego lin respondis: «Je Dio, ne diru tion, amiko! Mi havas sub tero mian bopatrinon».

XIX

En razejo: Kiel vi volas ke mi razu vin?

—Silente.

XX

Tre malpura homo, demandas al kuracisto:
Ĉu vi kredas ke mi bezonas iajn akvojn?

—Sendube.

Kaj kiuj, laŭ via opinio, estas la plej taŭgaj por mia malsano?

—Tiu ajn, kiujn vi volas, kondiĉe ke ili enhavu sufiĉe da sapo.

XXI

Vidvo montras sian domon al gastoj amikaj.—
Vidu, li diras, el tiu ĉi arbo pendiĝis miaj tri malfeliĉaj edzinoj.

Unu el la ĉeestantoj, kiu estas edzo, petis tuj al la vidvo branĉeton de l'arbo, por ĝin semi en sia domo.

XXII

Kio estas kan-fiŝkaptilo?

—Ilo kiu havas fiŝhokon ĉe unu fino kaj simplan mulon ĉe la alia fino.

XXIII

Komercisto, post montri al kamparano ĉiujn tasojn kiujn li havas en sia vendejo, mirita, aŭdas la aĉetanton diri:

«Vi ne havas tion kion mi deziras. Mi volas tason kiu havas la prenilon kontraŭe metita ol la viaj, tio estas, sur la alia flanko de la rondo.»

XXIV

Fianĉo konfesdonas la tagon de sia edziĝo. Finiĝita la afero, li diras al sia konfesprenanto. «Patro! Vi forgesis diri al mi la punon.» Ne, respondis la lerta pastro. «Vi jam ĝin havas.»

XXV

Ĝenulo diras al fraŭlino:

Certe mi divenus tion, kion vi pensas.

—Certe ne, ŝi respondis, ĉar se vi konus mian penson antaŭ longe vi forirus.

XXVI

En Sankta Vendredo, ludinto plendas, tial ke li perdis multe da mono.

Amiko diris: «Kompreneble vi perdis, ĉar vi ludis tiun Sanktan Tagon».

La perdinto respondis: «Ĉu la gajninto ludis ĉe Pasko?»

XXVII

Plaĉus al mi esti stelo, diras sinjorino.

Plaĉegus al mi ke vi tion trafus, respondis ŝin ŝia edzo, ĉar la plej proksima stelo estas tre fore.

XXVIII

Mi vetas, ke vi respondos nee al demando kiun mi faros al vi.

— Vetata.

Ĉu vi pruntas al mi kvin pesetojn?

— Ho! tion ne.

Do, venigu la kvin pesetojn al mia poŝo. Vi malgajnis.

XXIX

La tamburo, kiun vi vendis al mi, ne sonas.

— Mi tion esperis.

Kaj kial vi faras tamburojn?

— Por ilin vendi.

XXX

Ĉu vi vidas tiun homon? Mi malamas lin.

— Kial?

Li petis antaŭ ol mi, la manon de mia edzino kaj oni ĝin neis.

XXXI

Karbisto demandis al sia kolego.

Ĉu vi ĉeestis hieraŭ en maskobalo?

—Jes.

Mi ne vidis vin. Ĉu vi aliris maskovestita?

—Ne, sed estis neeble koni min, ĉar mi antaŭe estis min baninta.

XXXII

Ĉe Fraŭlinoj.

En la dudeka jaro: Kun kiu mi edziniĝos?

Post la dudeka jaro: Kiu edziĝos kun mi?

XXXIII

Virino diras al sia edzo: «Mi ne scias kial ni ne estas feliĉaj. Ni havas nur unu volon. Vi volas estri la domon kaj mi ankaŭ».

X

XXXIV

X

—Kiam vi pagos al mi la kvin pesetojn, kiujn vi ŝuldas al mi?

Ne estas kvin, ili estas dek, diris la ŝuldanton.

—Vi eraras, mi nur pruntedonis al vi kvin pesetojn.

Ho! Mi preferas ŝuldi al vi dek pesetojn, ol pagi al vi kvin.

XXXV

Ĉu Dio estas ĉie?

—Jes, sinjoro.

Do, Li estos en la korto de via domo.

—Ne, sinjoro.

Kiel, malsprita knabo?

—Tial ke mia domo ne havas korton, respektinda instruisto.

XXXVI

Fianĉo, baldaŭ edziĝonta, diris en la hejmo de sia fianĉino.

Morgaŭ matene, ni edziĝos, ni matenmanĝos en hotelo, vespere ni forveturos Italujon...»

La estonta bopatrino: Tre malbone.

La fianĉino: Patrino! Lasu lin paroli: la malfeliĉulo ordonas sian lastan volonton.

XXXVII

Ĉu vi volas klarigi al mi la nunan aferon pri la kapitalo kaj la laboro?

—Jes. Vi pruntepetas al mi cent pesetojn. Tio estas la kapitalo. Poste mi ne volas ilin redoni al vi. Jen estas la laboro.

XXXVIII

En vagonaro, sinjoro montras per sia montrafinĝro, al kunvojaĝantoj, la domojn kiujn oni vidas pase, dirante pri ĉio: «Mia».

Unu el tiuj-ĉi sinjoroj diris al li: «Sinjoro, vi eraras, tiu domo estas de amiko mia».

La interrompita respondis: «Mi ne rilatas pri domoj, sed pri mia fingro».

XXXIX

Ĉu eble vi reedziĝos?

—Jes, sed mi edziĝos kun bofratino.

Ĉiam estas edziĝo.

—Jes, sed mi gajnos, ne gajni alian bopatrinon.

XL

Urbestro diras al siaj administratoj:

«Ĝis nun, karegaj, ni estis devigataj sendi niajn frenezulojn al nia ĉefurbo. Mi esperas el via ŝparemo, la tian starigon de frenezulejo, nur por ni.»

XLI

Peto: Kara amiko: Sendu al mi, mi petas, pian libron titolitan «Timo de Dio».

Respondo: Karega. Mi trairis la tutan urbon kaj mi ne trovis librovendiston, kiu havas «Timo de Dio».

XLII

Kial vi ne loĝas en Madrido?

—Tial ke tie, la vivo estas karega. Mi nun tion farus, se mi, bedaŭre, havus la feliĉecon vidviĝi.

XLIII

Fraŭlino! Vi povas laŭdi vin, ke vi faris el mi aŭtomatulon.

—Ne, sinjoro, tio estis afero de viaj gepatroj.

XLIV

Kolego!, ni jam sufiĉe drinkis. Ni devas reveni hejmen.

—Vi eraras. Foje mi drinkas troe, sed neniam sufiĉe.

XLV

Rememoru ke ni estas dum la Sankta Semajno kaj ke vi devas trudi al vi kelkan ĝenon.

—Bone, bopatrineto, mi promenadis kun vi la Sankta Jaŭdo.

XLVI

Patro diras al sia filo:

Ĉu vi scias, kial mi batos vin?

Jes, patĉjo, tial ke vi estas pli forta ol mi.

XLVII

Sinjoro invitis manĝi manĝegulon kaj donis al li, unue, konfitaĵon.

La gasto ekdiris. En mia lando, oni prezentas laste tiun-ĉi manĝaĵon.

Ankaŭ tie-ĉi, respondis la invitanto.

XLVIII

Estas malfacilege ke virino feliĉigu homon.

—Vi eraras. Mi trovis unu.

Ĉu vere?

—Jes. Ŝi promesis edziniĝi kun mi kaj ĝin fari kun alia.

XLIX

En ekspozicio, antaŭ pentraĵo:

—Kion figuras tio?

La paŝadon de la Izraelidoj tra la Ruĝa Maro.

—Kaj kie estas la maro?

Ĝi jam foriris.

—Kaj la Izraelidoj?

Ili jam pasis.

—Kaj la Egiptoj?

Ili venos poste.

L

En Kalifornio, kiam mi tie estis, oni povis aĉeti grandan arbaron por paro da botoj.

—Kial vi ne ĝin aĉetis?

Ĉar mi ne havis botojn.

LI

—Kion ni donacos al via patrino, kara edzineto, en ŝia nomfesto?

Ian veston.

—Ne, vesto tuj rompiĝas. Ni donu al ŝi arĝentan telerarón; tio estas malavara donaco kaj poste ni ĝin rehavos.

LII

Senhara sinjoro, ĉiam konsilas al sia nevo, kion li devas fari pri tiu aŭ alia afero.

Iatage, la nevo ĝenita, diris al li, metante siajn fingrojn inter sia sufiĉega kaphararo: «Onklo! Faru tion-ĉi».

LIII

Vi faras malbone drinki. Ĉu vi ne vidas ke vi ĉiumomente faletas aŭ falas kiam vi marŝas?

—Mi ne faras malbone drinki. Sed marŝi post la drinkado.

LV

SinJORINO! oni ĵus mortigis vian edzon.

—Dio pardonu la mortiginton!

SinJORINO, li ne mortis ankoraŭ tute; eble oni povas savi lin.

—Dio mia, punu la kuŝpulon!

LV

Mastro. Oni diris al mi ke vi havas multe da azenoj; mi nur vidas du en via ĉevalejo kaj ni estas dek ekskursistoj.

—Trankviliĝu mia sinjoro. Kiom da ekskursistoj vi estos, tiom da azenoj vi vidos.

LVI

Du sinjoroj, el kiuj unu estis maljuna kaj malbela deziris edziĝi je belega, dekok-aprila fraŭlino. Kiam alvenis la decida tago, ŝi elektis la maljunulon.

Kial vi tion faris?, diris amikino al ŝi.

—Tial ke mi amas ilin ambaŭ, mi edziniĝos je l'junulo, post la morto de l'maljunulo.

LVII

Kien vi iras?

—Al la menaĝerio.

Tie, vi trovos mian edzon kaj mian bopatrinon.

LVIII

Kia horo estas la plej bona por manĝi?

—Por riĉulo kiam li volas, por malriĉulo kiam li povas.

LIX

Infano! Ĉu via patrino ĉeestas?

—Ne, sinjoro, li foriris.

Kaj vi scias, kiam ŝi revenos hejmen?

—Atendu, sinjoro, momente. Mi ĝin demandos al ŝi.

LX

Inter geedzoj: Kion vi farus Ernesto, se mi mortus

—Mi frenezigu?

Ĉu vi reedzigus?

—Mi ne frenezigu ĝis tia punkto.

LXI

Juĝisto diras al kulpigito:

«Vi sciigis min, ke vi parolis kun Alberto kaj nun vi diras ke vi ne konas lin.»

—Certe, sinjoro. Mi parolis kun li telefone.

LXII

Kantantino diris al sia kunulino:
 «Mia filino heredis mian voĉon.»
 Kunulino respondis naive:
 «Jen estas, kial, vi ne ĝin havas.»

LXIII

Naiva fraŭlino demandas al sia estonta bopatrino:
 «Ĉu mi pekis, kiam oni diras al mi ke mi estas
 bela kaj mi kontentiĝas?»
 —Jes, mia filino, Dio ne permesas ke ni fariĝu
 kunkulpaj de mensogo.

LXIV

Pastro veturas fervoje, sidante inter du malĝentiluloj, kies malĉasta interparolado ĉagrenas lin.
 Kiam ili foriris, la pastro humile diris al ili:
 Ĝis la revido!
 —Kial ĝis la revido? Eble ni neniam revidos nin.
 Jes, ni revidos nin, diris la pastro. Mi estas la pastro de l'malliberejo.

LXV

Homo rigardas valizon en bazaro. La vendisto diras al li:
 —Ĉu vi volas ĝin?
 Por kio?, diras la homo.
 —Por enmeti viajn vestojn, tolaĵon, k. t. p.
 Tiam, mi restos nuda!

LXVI

- Pro kiu vi portas funebran veston?
 —Pro mia bopatrino.
 Ĉu ŝi mortis?
 —Malplibone. Ŝi alvenis loĝi ĉe sian filinon kaj min.

LXVII

- Knabeto ploregas sur la strato.
 Sinjoro kompatas lian ploron kaj diras:
 —Kio okazas al vi?
 Mi perdis kvin centimojn.
 —Bone, prenu ilin kaj silentu.
 La knabo prenas la kvin centimojn kaj daŭrigas la ploregon.
 —Kial vi nun ploras?
 Ĉar se mi ne estus perdinta la kvin centimojn mi nun havus dek.

LXVIII

- Ĉu vi venos morgaŭ, doktoro:
 —Jes, ne timu. Okaze, mi estos vizitonta alian malsanulon, en ĉi tiu sama strato, kaj tiamaniere, mi mortigos du birdojn per unu sola pafado.

LXIX

- Kiom mi donus, por ke mi estu vi, nur du horojn! diris al edzo lia edzino.
 Kial? diris scivoleme la edzo.
 —Ĉar estante mi la edzo, dum tiuj du horoj, mi aĉetus belegan veston por mia edzineteto.

LXX

Ia kuracisto foriras ĉasadi ĉiujare dum monato Aŭgusto kaj oni diras ke tiu estas la sola monaro kiam li ne mortigas!

LXXI

Estos miraklo se mi estos premiata de loterio.

—Kiun numeron vi havas?

Neniun.

—Do, kiel estas eble ke vi estos premiata?

Tial, mi diras, ke ĝi estos miraklo.

LXXII

Edzo revenas hejme kaj trovas preĝantan sian edzinon.

Kial vi preĝas? li diris.

—Por via bonfarto kaj longa vivo.

Kiel? Ĉu vi ne diras ke mi malamas min?

—Jes, sed mia nuna edzo vangfrapis min, vi bastonbatas min, kaj mi timas ke la tria mortigos min.

LXXIII

Homo konscienca diris ĉiunokte kiam li kuŝiĝis:

—Mia Dio! Mi ne petas Vin, ke riĉaĵoj pluvu sur min, sed nur diru min kie ili estas kaj mi penados kapti ilin.

LXXIV

Via filo estas belega, diris sinjorino al sia amikino, sed ne plaĉas al mi, ke li estas ĉiam tiel malĝoja.

—Mi opinias kiel vi. Sed, kion fari? Ju pli mi batas lin, des malpli li korektas sin je tiu difekto.

LXXV

Kial vi estas funebre vestata?

—Tial ke mortis mia edzo.

Ho, kiel subite! Antaŭ nemultajn tagoj mi vidis lin, kaj li estis tiel forta kaj tiel...

—Ja, vi estas prava; tiel forta ke la tagon antaŭ lia morto, li batis min bastonade.

LXXVI

Homo eniris butikon por aĉeti metron. Li vidis kelkajn je malsamaj specoj.

Li demandis iliajn kostojn, sed ĉar li trovis ĉiujn multekostaj, li diris:

Ili ne taŭgas por mi. Certe, mi trovos malpli kostajn en la kontraŭa butiko.

Eble, respondis la vendisto, sed la miaj estas pli longaj ol la tieaj.

LXXVII

Homo sur strato disdonas prospektojn al ĉiuj preterirantoj. Sinjoro prezentas sian manon por ricevi unu. Sed la disdonanto diras al li:

—Ne, al vi ne. Vi havas barbon kaj mi anoncas razilojn.

LXXVIII

Kara amiko, kial vi ne volas ke via filo edziĝu?
 —Tiel ke mi ne volas ke mia edzino fariĝu bopatrino.

LXXIX

Drama verkisto renkontas amikon, kiu, oni diris al li, malaprobis lian dramon.

Ĉu vere vi malaprobis mian dramon? diris la verkisto.

Kiel mi povis malaprobi vian dramon, diris la amiko, se mi dormis dum ĝia reprezentado?

LXXX

Infano, ne petolu; ĉesu plori kaj lasu pace la sinjoron.

—Li ne ĝenas min. Plaĉegas al mi la infanoj kaj precipe kiam ili ploras.

Kia strangaĵo! Kiam ili ploras?

—Jes, ĉar tiam oni forsendas ilin en liton.

LXXXI

Ekdormis edzino kiu viglis sian mortintan edzon. Ŝi revis kaj vidis ke sia edzo sidas sur la ĉerko.

«Ne timu, edzino, li diris; mi reviviĝis».

—Sed, homo, kiam vi ĉesos ĉagreni min?

LXXXII

—Ĉu vi multe laboris de hieraŭ, filineto?

«Jes patrino. Mi faras la duan ŝtrumpon.

—Kie estas la unua?
«Nenie. Mi komencis per la dua.»

LXXXIII

Fianĉo konsiliĝis kun fama poeto pri kiu el du versoj de li verkitaj kaj dediĉitaj al sia fianĉino, li devas doni al ŝi.

La poeto legis unu kaj redonis al li la alian, dirante: «Donu al ŝi tiun ĉi, ne legitan de mi».

LXXXIV

—Ĉu vi estas en tiu-ĉi banejo pro via malsano?
—Ne, sinjoro, dank'al Dio pro malsano de mia edzino.

LXXXV

Du geinfanoj kreskis, ĝis viriĝis la unu kaj viriniĝis la alia, estimante sin reciproke kaj vidigante al ĉiuj ilian feliĉecon, tiel senkulpan, kiel tiu kiun havis Adamo kaj Evo en la Paradizo.

Iatage virino, ŝajne perfekta, diris al ĉiu el ambaŭ: «Via farmaniero ne estas bona».

De tiam la geamikoj interparolas kaŝe, ili ruĝiĝas kiam ili publike troviĝas, kaj la protektantino diras al si mem: «Mi ilin moraligis».

LXXXVI

Amiko! Kiel vi povas vendi viajn balailojn po dek centimoj ĉiu? Mi forrabis kanojn, ŝnuretojn kaj palmo-

branĉojn kaj mi faris malriĉan aferon vendinte ilin po dek-kvin.

—Malsaĝulo! Mi ilin forrabis jam konstruitajn.

LXXXVII

Post dek jaroj, du amikoj revidas sin kaj unu diras la alian:

«Ĉu fine Ludovikino trovis malsaĝulon por edziniĝi?»

Jes, diris la demandita: «Ni estas geedzoj.»

LXXXVIII

Edzo, kiam parolas pri sia edzino, ĉiam diras: «Mia kara okono».

Amiko petis al li klarigon pri tio kaj li respondis:

—Mia edzino estis la duono de sia unua edzo; sekve, la kvarono de la dua, kaj la okono de mi, kiu estas la tria.

LXXXIX

Avarulo perdis unu peseton. Li kaj ĉiuj la domanoj ĝin serĉas. Li ĝin trovas kaj silentas.

Lia edzino eksciigante pri tio diris al li: «Kial vi ne avizas pri la trovo?»

—Ĉar se oni trovas alian peseton, mi havus du.

XC

Kiel fartas via bopatrino?

—Ŝi fartas plibone, sed ankoraŭ mi ne perdis tutan esperon.

XCI

Notario kutimas viziti la fianĉojn amikojn, en la antaŭtagon de ilia edziniĝo. Li gratulas ilin kaj post diras: «Memoru ke antaŭzorgita homo, devas testi dum tuta posedo de siaj animaj sentoj kaj post morgaŭ vi ne havos plenan volonton.

XCII

Oni diras ke la brandon ŝategas al vi.

—Ho! Jes, sinjoro.

Kaj kiel vi ĝin drinkas?

—Mi diros al vi: unue mi drinkis ĝin kun akvo, poste sen akvo, kaj nun, kvazaŭ ĝi estus akvo,

XCIII

Amiko! Kial vi ĉiam nomas kara, vian edzinon, malgraŭ vi diras ke vi ne amas ŝin?

—Pro tio ke ŝi kostas al mi la tutan monon, kiun ŝi malŝparas.

XCIV

Johanĉjo parolas kun sia fianĉino kaj multe rigardas la murhorloĝon.

La knabino rimarkigas lin pri tio kaj li diras:

«Ĉu vi kredas ke mi enuiĝas apud vi.»

—Ne, respondas las lerta virineto, sed mi kredas ke vi garantie donis vian poŝhorloĝon.

XCV

Nepriokupa sinjoro, invitis danci skrupulan knabinon.

Tiu ĉi diris al li malŝate. «Mi vidas ke vi ne vestas gantojn».

«Ho! ne ĝenu pro tio», li respondis. «Mi lavos miajn manojn post la danco».

XCVI

Servanto diris al sia dormanta sinjoro.

Sinjoro! Sinjoro! via bopatrino ĵus mortis!

—Ho! Kiel malĝojon mi havos morgaŭ, kiam mi vekigos! respondis la bofilo.

XCVII

Fraŭlino surprizas sian servistinon, kiu purigas siajn dentojn per ŝia broso.

Kial vi tion faras? diras la fraŭlino.

Mia mastrino, respondis la servistino, via dentbroso ne naŭzas min!

XCVIII

Sinjoro, kiu celas ricevi la ordenon de bonfarado, diras ke li savis la vivon de multaj personoj.

Kiel? oni demandis lin.

Tre simple, li diris, mi estas kuracisto de mia dudeka jaro; nun mi estas sesdekjara kaj mi neniam ekzercis mian profesion.

XCIX

• Edzo ricevas sian edzinon en stacidomo.
 Post kutimaj edzaj salutoj, ŝi diras: «Viaj patroj
 ne volis ke mi venu».
 Mi tion bone kredas, respondas la edzo. Ili tre
 amas min.

C

La fromaĝo faras simplanimulon el tiu, kiu man-
 ĝas ĝin.
 Ne diru sensencaĵon! Mi manĝas ĝin ĉiutage kaj
 mi ne pensas ke mi estas simplanimulo.
 —Efikoj de l' fromaĝo!

CI

Laŭ diro de Milton, reĝo povas esti kronata je
 l'aĝo dekkvarjara, sed li ne povas edziĝi ĝis kiam li
 estas dekokjara, ĉar estas multe pli malfacile regi
 virinon ol regi regnon.

CII

Enirante en teatron, junulo puŝas sinjorinon.
 Beston! Ŝi ekdiras.
 Pardonon! petas per dolĉa voĉo la aludito.
 Vi al mi sinjoro, reparolas la sinjorino, mi kredis
 ke la puŝanto estas mia edzo.

CIII

Malfeliĉa homo plendas pro tio, ke neniu havas
 por li ĝentilaĵojn, ĉar li estas malriĉa. Amiko diras al

li: «Ne suferu. Tago alvenos, en kiu ĉiuj trovantaj vin sur la stratoj salutos vin».

—Kiam?

«Kiam vi mortos.»

CIV

Verkisto diras pri kolego «Li estas spritega». Ĉeestanto ekdiras. «Ja, li ne diras same pri vi». «Eble ambaŭ ni eraras», respondas la verkisto.

CV

Edzineto, mi mortiĝas, mi petas al vi lastan favoron:

Post mia morto edziĝu kun mia frato.

—Ne eble, karega. Mi havas alian kompromison.

CVI

Post longega vizito: Je Dio, Sinjoro, ne prenu sur vi la ĝenon eliri kun mi ĝis la pordo.

—Ne estas ĝeno sinjoro, estas plezurego.

CVII

Fraŭlino, mi kuraĝas peti al vi...

—Bedaŭrinde, sinjoro, mi jam promesis ĉiujn dancojn.

Pardonu, fraŭlino, mi ne petas dancon, sed nur ke vi stariĝu, ĉar vi sidas sur mia ĉapelo.

CVIII

Kelkaj amikoj ludas. El du perdantoj, unu brulplendas kaj la alia silentas. Tiu-ĉi diras al tiu.—Kial vi tiel krias? Ĉu vi ne vidas kiel mi perdas ne dirante vorton?

Amiko, diris la demandato. Vi silentas, tial ke viaj doloroj estas pli grandaj ol la miaj kaj mutigas vin.

CIX

Kiel edzeco ŝanĝas la ideojn!

Ĉu vere?

—Jes, kredu min. Kiam mi estis fianĉo, plaĉis al mi ĉiuj virinoj, sen escepto.

Kaj nun?

—Nun, plaĉas al mi ĉiuj virinoj, esceptinte la mian.

CX

Sinjoro invitis matenmanĝi senhontan amikon, kiu metis en sian poŝon kafkulereton. La sinjoro, kiu tion vidis, faris same je alia kulereto kaj diris al sia servanto kiam tiu-ĉi senigis la tablon.

«Petro, vi ne kalkulis la manĝilarojn antaŭ kaj post nia manĝado: Certe ne, ĉar tiu ĉi sinjoro kaj mi ŝercis vin foriginte du kuleretojn. Jen estas unu en mia poŝo kaj alia en poŝo de mia amiko. De nun, havu pli da zorgo.

CXI

Sinjoro! Kiam vi pagos al mi la veston kiun mi elfaris por vi?

—Vi faras pensi al mi pri infanoj.

Kial?

—Tial ke, same kiel ili, vi faras demandojn al kiuj mi ne scias kion respondi.

CXII

Post la Edziĝo. Matildo, mia bela, ni restos en la kamparo dum la tuta daŭro de nia amo.

—Plezure. Sed prenu bileton de iro kaj reveno.

CXIII

Vulpo pasis iam, tra korto en kiu estis pluvakvujo enhavanta malmulte da akvo: ĝian fundon rigardante, ĝi vidis en ĝi multajn fiŝojn; incitata de ĝia manĝege-mo kaj inspirata de sia ruzeco, ĝi sin ĵetis sur kuvon pendantan de ĉeno kaj per sia pezo facile malsupreniris en la pluvakvujojn, samtempe ke altiĝis alia kuvo, kunligita je la dua ekstremaĵo de la ĉeno.

Manĝinte tiom da fiŝoj kiom ĝi deziris, la vulpo decidis eliri el la akvujo, sed ĝiaj penoj por la supreniro restis vanaj kaj senefikaj.

Kiam ĝi senespere ploris sian malfeliĉon, katblekoj eldistris ĝin el ĝia ĉagreno.

Ekvidinte savrimedon, la vulpo ekparolis fiate kaj aminde:

—Karaj amikoj: ĉu vi estas gekatoj? Estu feliĉaj je viaj amoj. Mi estas fiŝo tiel amanta vian genton, ke mi estas preta tuj oferi mian vivon kaj ankaŭ tiun de miaj kunvivantaj kamaradoj por via feliĉeco. Eksaltu, do en la kuvon kiun vi vidas super mi, kaj tuj vi alvenos en festenejon, kie vi eterne ĝuos la feliĉaĵojn de geedza vivo.

La kato diris:—Mi estas maljuna kato kaj mal-
multe ŝatas la danĝerajn aventurojn: post pripensado,
mi...

—Malkuraĝulo! blekrespondis ĝia *Evo*, kaj ambaŭ
saltis en la kuvon kaj reciproke ĉirkaŭprenitaj mal-
supreniris en la profundegajon.

Samtempe la ruza vulpo saltis sur la malsupran
kuvon, eliris el la pluvakvujo kaj ankoraŭ vivas
dank'al tiuj gekatoj simplanimaj...



